

Enkonduko

Same kiel ne eblas kalkuli esperantistojn, ankaŭ ne eblas precize nombri ŝatantojn de akvariaj fiŝoj. Multbranĉa merkato de akvariaj varoj permesas supozi, ke la kvanto de akvariistoj estas kelkdek milionoj da homoj. Lastatempe en Rusio iĝis prestiĝe havi akvariojn kun dolĉa aŭ mara akvo en oficejoj aŭ grandaj vendejoj. Popularaj estas televidaj intervjuoj sur fono de grandaj akvarioj. La posedantoj de tiuj multekostaj akvarioj dungas ankaŭ specialajn servistojn, kiuj zorgas pri fiŝoj. Tamen kiu ajn homo povas senprobleme aranĝi en sia hejmo similan anguleton de subakva naturo sen grandaj elspezoj. Ofte kuracistoj rekomendas tiun okupon al siaj pacientoj kiel ŝirmilon kontraŭ streĉaj okazaĵoj de ĉiutaga vivo.

La nuna industrio de porakvariaj varoj rapide evoluas kaj uzas sciojn de spertaj inĝenieroj kaj sciencistoj, oni organizas ekspediciojn al foraj regionoj de Azio, Afriko kaj Suda Ameriko por eltrovi novajn speciojn da fiŝoj, taŭgajn por vivi en limigita spaco.

Akvariiko, vole-nevole, same kiel Esperanto, estas afero internacia. Unue, ĉar akvariistoj estas devigataj lerni geografiajn regionojn kaj ties vivkondiĉojn por fiŝoj, kiujn akvariistoj bredas. Due pro tio, ke venintaj el diversaj regionoj fiŝoj havas plej parte internaciajn, sed foje lokajn nomojn.

Preskaŭ ĉiam vendistoj donas al nova fiŝo kromnomon, kiu diferencas de la scienca. Oni ĉefe celas elekti kurtajn allogajn nomojn, kiuj

tamen trafe karakterizus prezentatan specion. Tiel aperis, ekzemple, la nomo «neono» por fiŝeto el Amazonio, kies eksteraĵo memorigas al homoj neonajn lampojn de reklamiloj. Kompreneble «neono-tetro» sonas pli alloge, ol longa kaj malfacile prononcebla latina «*Paracheiroduon innesi*». Tiel ankaŭ aperis kaj daŭre aperas misteraj «Princino de Burundio», «Reĝino de Njaso» kaj multaj aliaj. Al parto de tiuj nomoj oni alku-timiĝas kaj vaste uzas, la aliaj malaperas. Tamen okazas, ke sciencajn nomojn oni de tempo al tempo revizias, dum kromnomoj havas pli longan historion. Ekzemple, la jam menciita neono antaŭ kelkdek jaroj havis scienca nomon *Hyphessobricon innesi*, kiu ne plu estas uzata, sed kiel neono la fiŝeto restas konata en multaj landoj ĝis nun.

En multaj lingvoj ĉiujare estas eldonataj de-koj da libroj kaj revuoj pri akvariiko. Tiu ĉi libro ne estas speciala scienca verko. Des pli ni ne konsideras ĝin kiel novspecan terminaron. Ni esperas, tamen, ke homoj, kiuj emas uzi Esperanton en ĉiutaga vivo, des pli homoj, kiuj ŝatas la naturon, trovos la libron iom interesa por si.

En la priskriboj latinajn nomojn ni presas *kursive*, kaj la esperantajn ekvivalentojn – **grase**.

La ideon de la proponata serio sufloris al ni antaŭ kelkaj jaroj la forpasinta slovaka esperantisto el Poprad Milan Zvara. Li esperis eldoni ĉe «Impeto» Enciklopedion de manĝeblaj fungoj.

Ni dankos ĉiujn novajn opiniojn pri la temo.

La eldonintoj